


04171 Stacio sur traira linio kun unu aŭ pluraj koneksaj linioj, konstruita por trajnoj netrairaj inter la traira kaj koneksa(j) linioj.

| | | | |
|---------|--------------------------------|-----------------------------------|--------------------------|
| ĉeĥa | <i>připojná stanice</i> | slovena | <i>prestopna postaja</i> |
| dana | <i>tilslutningsstation</i> | Esperanto ĝis nun: stacio koneksa | |
| franca | <i>gare de correspondance</i> | | |
| germana | <i>Anschlussbahnhof</i> | | |
| hungara | <i>csatlakozó állomás</i> | | |
| itala | <i>stazione di coincidenza</i> | | |
| kroata | <i>priključni kolodvor</i> | | |
| norvega | <i>tilslutningsstasjon</i> | | |
| pola | <i>stacja skomunikowania</i> | | |
| rumana | <i>stație de legătură</i> | | |



Kvankam ekzistas speciala trakaro por komenciĝantaj / finiĝantaj trajnoj, per la streketita trakinterligo eblas ankaŭ (escepta) trajntrairo de / al la koneksa linio. Trakaroj sen tia interligo reale apenaŭ ekzistas, se ambaŭ linioj estas samŝpuraj. Termina ŝanĝpropono: **stacio konekse disforka**

Due temas pri sekuriga instalaĵo.

09250 Instalaĵo ĉe du relative malproksimaj lokoj, funkcianta tiel, ke - per enmeto de unua ŝlosilo en seruron ĉe unu de ambaŭ lokoj eblas elmeton de dua ŝlosilo el seruro ĉe la alia loko, kaj - elmeto de la dua ŝlosilo malebligas elmeton de la unua.

| | | | |
|---------|-----------------------------------|---------|---|
| ĉeĥa | <i>klávesnicový vysílač</i> | itala | <i>trasmettitore di chiave</i> |
| dana | <i>klíčové závislosti</i> | kroata | <i>naprava za oslobađanje ključeva</i> |
| franca | <i>nøgletransmitter</i> | norvega | <i>apparat for frigiving</i> |
| germana | <i>Schlüsselfolgeabhängigkeit</i> | pola | <i>zwolnienie zależności kluczonej</i> |
| hungara | <i>kulcsos függés feloldása</i> | rumana | <i>dispozitiv de despiedicare cu chei</i> |
| | | slovena | <i>sprostilnik ključa</i> |

Esperanto ĝis nun: instalaĵo ŝlosilsekuriga

Ĉar tia procedo aliloke nomiĝas „interriglado”, jen du terminaj ŝanĝproponoj:

- 1) ŝlosilinterrigla instalaĵo 2) serurinterrigla instalaĵo

Trie temas pri modifo de relprofilo.

12690 Redukto de relalma-rielpieda parto ĉe kalkano de flekseblaj nadloreloj, por faciligi ties fleksiĝon.

| | | |
|---------|---|---|
| angla | <i>relief planing</i> | Esperanto ĝis nun: relprofilata reduktaĵo |
| franca | <i>débardement</i> | |
| germana | <i>Federstelle</i> | |
| itala | <i>lavorazione degli aghi</i> | |
| kroata | <i>podrezivanje korijena prijevodnice</i> | |
| rumana | <i>loc flexibil</i> | |

Esperanto ĝis nun: relprofilata reduktaĵo



- 1) relprofilata redukto ĉe nadlorelkalkano
2) nadlorelkalkana redukto

Karaj geamikoj, en *Herzberg* ni diskutos kaj decidus pri solvoj. Mi petas kolegojn, kiuj ne ĉeestos en niaj kunsidoj, sendi preferojn aŭ proponojn antaŭe al mi.

Antcipe dankas kaj salutas *Heinz Hoffmann*.

Terminara Kuriero

TeKu 144

Aprilo 2012

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablenail.de

NEKROLOGO

Jam 9-an de Oktobro 2011 mortis nia serba terminara kunlaboranto, magistro **Gvozden Sredić**, en sia 76-a Vivojaro. Li apartenis al la plej elstaraj fervojistoj-esperantistoj.

Kiel diplomita ekonomisto li plenumis sian plej altan funkcion en la kompanio *Intercontainer*. En 1998 aperis lia kvinlingva Terminaro de kombinita transporto. Li estis ankaŭ kunaŭtoro de seslingva Manlibro pri konversacio en fervoja trafiko. Ambaŭ verkoj enhavas ankaŭ Esperanton. Kiel esperantisto ek 1953, **Gvozden Sredić** verkis lernolibron, serblingvan libron pri Esperanto ĉe Jugoslavaj Fervojoj, tradukis la vartransportajn regulojn *CIM* en Esperanton, laboris kiel ĉefredaktoro de „Jugoslava Fervojisto” kaj estis membro de Esperanto-Instituto en Beogrado. De 1968 ĝis 1972 li funkciis kiel IFEF-vicprezidanto, kaj ĝis 1997 kiel prezidanto de tiama JAFE. Pro liaj meritoj li estiĝis Honora membro de IFEF kaj ricevis Oran medalon de *FISAIC*. Ne forgesata li ripozu en paco.



Mag. Gvozden Sredić

Diferencaj indikoj en UIC-terminaroj

En TeKu 143 sur paĝo 1 mi informis pri apero de nova CD-ROM-disko *RailLexic 4.0*. Nia gvidanto *Jan Niemann* ricevis la senpagan ekzempleron por IFEF. Plia ekzemplero kostus 145 € + imposto + sendo. La disko estas nur trifoje instalebla. En *Herzberg* ni traktos necesajn paŝojn por optime ebligi uzon fare de niaj kunlaborantoj kaj de aliaj interesatoj.

La apero motivigas trakti la diferencajn indikojn laŭ ekzemploj en la libroforma FERVOJA TERMINARO (FT) kaj en la ekrantekstaj terminaroj *RailLexic 3* kaj *RailLexic 4*. La diferencoj troviĝas ĉefe ĉe jenaj du specialaĵoj:

a) Terminaj variantoj

En naciaj lingvoj ofte, en Esperanto tre malofte, ekzistas al 1 nocio pluraj terminvariantoj. FT (nacia termino) NT70/1237 bloksekcio; kantono

RailLexic 3 Term / Terme kantono Key / Clé 012370 TG NT70
Definition / Définition Traksekcio inter du sinsekvaj ĉefsignaliloj, en kiun

enveturo de trajno estas permesata nur, se en ĝi ne troviĝas veturilo.

Noto: Kantono ekipita per bloksistemo = bloksekcio

Term / Terme bloksekcio Key / Clé 012371 TG NT70

Definition / Définition Traksekcio ... Noto: Bloksekcio = kantono ekipita per bloksistemo

RailLexic 4 kantono 012370 *Subject fields / Domaines / Fachgebiete* NT70
Definition / Définition Traksekcio veturilo.

Note / Commentaires / Anmerkung Atentu! kantono ekipita per bloksistemo = bloksekcio bloksekcio 012371 *Subject fields / Domaines / Fachgebiete* NT70

Definition / Définition Traksekcio veturilo.

Note / Commentaires / Anmerkung Atentu! bloksekcio = kantono ekipita per bloksistemo

En *RailLexic* la dezirata termino estas enigenda en la maldekstran serĉkolumnon. En *RailLexic 4* (do ne en ties 3-a eldono) poste ĉiam necesas alklaki: *Search / Recherche / Suche*. La ŝlosilnumero estas en FT 1- ĝis 5-cifera (sen antaŭaj nuloj). En *RailLexic* ĝi estas ĉiam 6-cifera. La unuaj 5 ciferoj (inkluzive de kompletigaj antaŭaj nuloj) koncernas la nocion saman en ĉiu lingvo. La 6-a cifero (pleje nulo) indikas la terminvarianton nur en la koncerna lingvo.

La difino ne troviĝas en FT. En *RailLexic 3* ĝi (se ekzistas) nur aperas post alklako de *Definition / Définition*. En *RailLexic 4* la difino aperas tuj.

En *RailLexic 3* la indiko de variantoj estas iom komplika: Se ekzistas pluraj variantoj, aperas graslitera V. Post ties alklako aperas tabelleto de la variantoj. Por legi fakon, noton kaj difinon, necesas nova terminenigo en la serĉkolumnon. En *RailLexic 4* la variantoj aperas tuj.

b) Pluraj vicordoj de vortoj aŭ vortelemantoj

Por faciligi alfabetan serĉon, la koncerna termino troviĝas plurfoje en la listo.

FT sur malĝusta trakflanko (eltrajniĝo de pasaĝeroj) PR40/2061 (*nacia termino*)
trakflanko [sur malĝusta -] (eltrajniĝo de pasaĝeroj) PR40/2061 (*nacia termino*)

RailLexic 3 Term / Terme sur malĝusta trakflanko Key / Clé 020610 TG PR40
Term / Terme trakflanko (sur malĝusta -) Key / Clé 020611 TG PR40
Note eltrajniĝo de pasaĝeroj

RailLexic 4 sur malĝusta trakflanko 020610
trakflanko: sur malĝusta trakflanko 020610
Subject fields / Domaines / Fachgebiete PR40
Note / Commentaires / Anmerkung eltrajniĝo de pasaĝeroj

En *RailLexic 3* diversaj vortordoj estas traktataj kiel terminvariantoj. Vidu sub a).

En *RailLexic 4* sole en la serĉkolumno troviĝas la aldona vorto por alfabeto serĉo.

Kontribuoj al taskoj en TeKu 142/143

Lastatempe alvenis kontribuoj de *Heinz Diedrich Hartig, Zlatko Hinšt, Jaroslav Matuška, Erik Mortensen, Jan Uldal Niemann, E Henning Olsen* kaj *Naosuke Nobuki*. Elkoran dankon al ili. Jena listo montras iliajn elektojn:

TeKu 142

05572 trifoje **navedulo**, unufoje **tagmigranto**
05573 kaj 08974 kvinfoje **trafiko navedula** por ambaŭ numeroj,
dufoje **trafiko navedula** por 05573, kaj
trafiko laboristara por 08974,
unufoje **trafiko de tagmigrado** por ambaŭ numeroj

05837 kaj 09075/09136 kvinfoje **trajno navedula** por ĉiuj 3 numeroj,
dufoje **trajno navedula** por 05837, kaj
trajno laboristara por 09075/09136,
unufoje **trajno tagmigrada** por ĉiuj 3 numeroj
08068 sesfoje **vagonartrafiko naveda**,
unufoje **vagonartrafiko ir-reira**
07134 sesfoje **motorvagonaro ambaŭkape kondukebla**,
unufoje **motorvagonaro kun ambaŭkapaj kondukistejoj**
09047/09165 kvinfoje **trajnkompleto lokomotiva-stirvagona**,
unufoje **trajnkompleto trena-puŝada**
05442 dufoje **trakcio lokomotiva-stirvagona**
09153 kvinfoje **pasaĝervagonaro plurtrajna**,
unufoje **pasaĝervagonaro duobla**

Teku 143

04173 sesfoje **sakstacio**
10280 trifoje **pantografalto minimuma**,
trifoje **pantografalto mallevolima**
unufoje **pantografalto momenta**
10286 kvarfoje **pantografa levozono**,
10281 dufoje **pantografa levodistanco**
kvarfoje **pantografa funkciadzono**,
unufoje **pantografa efikodistanco**,
unufoje **pantografa funkciadistanco**

Novaj taskoj

Unue temas pri stacio, kie komenciĝas / finiĝas branĉlinio. Se tia ejo situas ekstere de stacio, ĝi nomiĝas „disforkejo” (06660). Sekve por koncerna stacio taŭgas la termino „disforka stacio”. En la UIC-terminaro troviĝas du specoj de tiaj stacioj. Reale ekzistas ankaŭ multaj miksaĵ formoj.

04159 Stacio kun branĉlinio, konstruita por trajnoj traŭraj sur ambaŭ linioj.

| | | | |
|---------|-------------------------|-----------|----------------------------------|
| bulgara | възелна ж.п. гара | rumana | stație cu două direcții pe capăt |
| ĉeĥa | odbočná stanice | slovena | cepna postaja |
| dana | forgreningsstation | Esperanto | ĝis nun: stacio disforkeja |
| franca | gare de bifurcation | | |
| germana | Trennungsbahnhof | | |
| hungara | elágazó állomás | | |
| itala | stazione di diramazione | | |
| kroata | odvojni kolodvor | | |
| norvega | avgreiningsstasjon | | |
| pola | stacja rozgałęźna | | |

Kvankam okazis konstruo por traŭraj trajnoj, eblas ankaŭ (esceptaj) komenciĝoj / finiĝoj de trajnoj, sed sen speciala trak(ar)o por tio.

Termina ŝanĝpropono: **stacio traire disforka**